

Decidoj de la Komitato de ILEI faritaj rete en 2011

Ekde la akcepto de la regularo por reta voĉdonado en aprilo 2011 ĝis la fino de 2011, kun pli freŝaj supre:

Voĉdono Komitata 2-2011, finiĝinta en la 31a de oktobro 2011.

Validaj voĉoj ricevitaj: 36

1.1 La komitato akceptis la protokolon de la unua sesio kopenhaga (jam akceptita de la komitato surloke en la tria sesio)

JES 34 NE 0 SINDETENO

1.2 La komitato akceptis la protokolon de la dua sesio kopenhaga.

JES 34 NE 0 SINDETENO 2

1.3 La komitato akceptis la protokolon de la tria sesio kopenhaga.

JES 33 NE 0 SINDETENO 3

2.1 La komitato akceptis duvortan aldonon ĉe artikolo 7.2.7

rajtas okazigi skribajn **kaj retajn** voĉdonojn de la komitatanoj;

JES 35 NE 0 SINDETENO 1

2.1 La komitato akceptis du aldonojn ĉe artikolo 7.2.8 por konformigi ĝin kun artikolo 7.1.16:

rajtas nomi kaj anstataŭigi pagatajn oficistojn **kaj kompensatajn volontulojn por taskoj** aprobitaj de la Komitato laŭ artikolo 7.1.16;

JES 34 NE 0 SINDETENO 2

Voĉdono Komitata 1-2011 de la 17a de majo ĝis la 20a de junio.

1. La komitato akceptis malgrandan modifon al la Regularo pri Honoraj Membroj, por ebligi la honorigon de forpasintoj.

Akceptita per 21 poraj voĉoj, unu kontraŭ kaj neniuj sindetenoj. La kontraŭa voĉo rilatis al nur unu el la du proponitaj modifoj.

2. La komitato akceptis, ke la trijara mandato de la Elekto-Komisiono venu al fino en la komitat-kunsidoj okazigitaj unu jaron pli frue ol la laŭplanaj estrarelektoj.

Akceptita per 21 poraj voĉoj, neniuj kontraŭ kaj unu nedeklarita— sekve la komitato nomumis en Kopenhago elekto-komisionon por ofici de 2011 ĝis 2014.

Por vidi la resumon de la 11 decidoj faritaj skribe en la komenco de 2011, kaj la 19 decidoj faritaj en Kopenhago, bv. vidi ĉe [KOMITATAJ VOĈDONOJ 2011 kaj 2012 – Resumo.](#)

Resume:

En 2011 okazis 37 decidoj, 19 en Kopenhago, 7 rete kaj 11 papere.

En 2012 okazis 29 decidoj: 16 en Kunmingo, 13 rete.

Ambaŭjare okazis 66 decidoj, 35 en konferencoj, 20 rete kaj 11 papere.

En 2011 estis akceptitaj 14 Statutmodifoj, 17 modifoj de la Interna Regularo kaj 1 ĉe aliaj regularoj

En 2012 estis akceptitaj 1 Statut-modifo, 18 modifoj de la Interna Regularo kaj 2 ĉe aliaj regularoj

Ambaŭjare akceptiĝis 15 Statutmodifoj, 35 modifoj de la Interna Regularo kaj 3 ĉe aliaj regularoj

Do, inter la 66 decidoj de la Komitato okazis 53 modifoj al nia Statuto kaj ceteraj Regularoj.

Ekde la starigo de reta voĉdonado ĝis la fino de 2012 okazis en la daŭro de 19 monatoj 7 voĉdonsesioj. Ĉiu voĉdono plenumis la kvorumajn postulojn. Neniu rete farita propono estis rifuzita.